
# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)
http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/k34.html





Jen la nova estraro


*Marteno Bustin Benito*
Prezidanto


**Maro Guirao**
Vicprezidanto


Jozefo Pina:
**sekretario**


Jozefo Maria Bernabéu
**Kasisto**


Johano A. Cabezos Martínez
Voĉdono


Nikolao Sil Karbaĝo
Libroservo


Jesuo
Redaktoro.

**Nº 34** **Aprilo/Junio 1997**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* ***Martín Bustín Benito.***
*Apartado de Correos 4143*
*ES03080 ALICANTE*

*Vicprezidanto:* ***María del Mar Guirao Gallego***
*Avd$^a$ Juan Carlos I, 22-8°-4,*
*30800 LORCA (Murcia)*
*Hispanio.*

*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ St$^a$ Teresa, 22-2° CD,*
*ES30005 MURCIA*

*Kasisto:* ***José María Bernabéu Franco***
*Gral. Primo de Rivera, 8*
*E-03360 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*

*Libroservo:* ***Nicolás Gil Carballo,***
*Apartado 305*
*ES24080 LEÓN*

*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* ***nova konto n° 1302 0412 86 0022655110*** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.* La abono kostas 1000 pesetojn. Kvintancon oni ricevos.


*Faras la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Administro:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**


**Kovrilo**: La nova teamo de HALE rigardas la averton faritan de *Snajpero*. Ĉu ni realigos tion?

# Enhavo


Paroloj el la Prezidanto ........ 3
Redaktore ........ 4
Labormondo: Sociala asekursistemo ........ 5
Al Patrino, ........ 6
Ekologio kaj kaŝloĝado ........ 7
Ĝenerala Kunsido de HALE ........ 9
Ni serĉas ........ 11
Biografiaj donitaĵoj pri Bernard Golden ........ 12
Ĉu Gonçalo Neves ankoraŭfoje faris mave mizeran mispaŝon? ..... 13
La reto, aŭ la defio de la novaj teĥnologioj ........ 15
Libroservo ........ 18
Kio infano estas ........ 17
Debatindaĵoj: K.F.D: 13ª al 15ª demandoj. ........ 19
ESPERANTO, aparta muzika sperto ........ 21
Pri esperantaj verboj ........ 23
Demokratio kaj malsubmetiĝo ........ 25
La paĝo de Fernando Sor ........ 26
Llrikaj perloj el Al-Andalus ........ 27


Oni **povas reprodukti** artikoloj, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Informoj de la Prezidanto

La 7-an de februaro okazis en urbo Murcio ĝenerala kunsido de HALE. Fine kompletiĝis la vakantaj postenoj. **José Pina Tuells**, el Murcio, estis elektata sekretario, kaj **María del Mar Guirao Gallego**, el Lorko, vicprezidantino. Akton de tiu kunveno vi povos legi en nia bulteno, do, mi nur ĝin komentos donante personan opinion pri la asocia situacio.

En la nomita kunveno, inter aliaj, estis propono de la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo*** por ke HALE malaperu kiel nacia LEA-o, kaj fariĝu ia internacia aŭ tutmonda Asocio por ke ĝi estu pli multnombra, kaj grava. Estas bedaŭro, ke en nia HALE - estraro ne ĉiuj membroj estas SAT-anoj, kaj ili ne konas la celojn de SAT, inter kiuj troviĝas tiu proponita de Jesuo de las Heras por nia hispana LEA-o. Ankaŭ nia samideano komentis, ke li estis membro de SAT sed eksiĝis ĉar li trovis ke tiu asocio ne estas sufiĉe avangarda kaj radikala pri la sociaj problemoj. Mi ne pensas ke UEA, de kiu li estas fakdelegito, estas pli avangarda aŭ radikala ol SAT. Mi komentas tion ĉar la influo de la neŭtrala movado en la laboristaj organizoj montriĝis malfavora, kaj foje pereiga. Mi povas citi kiel ekzemplon la malaperigo de la nederlanda FLE kiu fariĝis neŭtrala esperantista landa societo. Tiurilate estas interesa la artikolo *Problemoj en nia laborista familio*, verkita de la eksredaktoro de ***Kajeroj el la Sudo***, Antonio Marco, en la numero 24. Nia sveda kamarado Pelle Persson informis pri malfacilaĵoj en la SLEA pro influoj ne kongruaj kun la celoj de la sveda LEA-o, kaj nia HALE estis dum pluraj jaroj sekcio de HEF pro decido de kelkaj HALE-anoj samtempe membroj de SAT, kaj de HEF. Laŭ mi, por nia LEA-o HALE estus bone, ke ĉiuj SAT-membroj estu HALE-membroj, kaj reciproke, ĉiuj HALE membroj estu SAT membroj sed sinceraj.

Ankaŭ en la numero 3 de ***El Correo del Esperanto*** oni povas legi: *Los esperantistas murcianos editan un nuevo número de su Revista. La asociación de los esperantistas de Murcia, que recientemente celebró su congreso, ha editado un nuevo número de su revista **Kajeroj el la Sudo**...*[1] La skipo kiu eldonas ***El Correo del Esperanto*** bone scias ke tiu aserto estas falsa ĉar kelkaj el ili redaktas aŭ kunlaboras pri la eldono de ***Kajeroj el la Sudo***, kaj ĝi scias ke tiu ĉi estas tute sendependa de la neŭtrala aŭ ia ajn movado.

Do, post la faktoj kiujn ni sciigas al vi, eblas konkludi pri malhelpaj agoj al nia LEA-o HALE.

Esperehle ni ĉiuj meditos por trovi la veran kaj justan vojon al niaj esperantaj laboristaj aspiroj.

Kun elkoraj amikaj salutoj,

*Marteno*

[1] La murciaj esperantistoj eldonas novan numeron de sia revuo. La asocio de esperantistoj de Murcia, kiu antaŭ nelonge havis sian kongreson, jus publikigis novan numeron de sia revuo ***Kajeroj el la Sudo...***

# Redaktore *Ne tiel, sed tiel ĉi!*

Nia kamarado prezidanto plendas, prave, pri du gravaj malkonsentoj okazintaj je la lasta Ĝenerala Asembleo, nome: mia *atenco* kontraŭ HALE kaj la turpa recenzo kiun murcia ĵurnalisto faris pri la apero de numero 33 de ***Kajeroj el la Sudo***.

Mi opinias ke mankas stilo al redaktoro kiu respondas al kritikoj faritaj al si en la sama numero de la revuo, ĉar tio estas iasence perfida kaj maljusta. Tial, mi tion ne faros; kaj fakte estas sufiĉaj aliaj aferoj por pritrakto kiuj estas pli gravaj kaj urĝaj. Uzu vi, leganto, vian *pensilo*n kaj decidu post kiam vi legos la *Informojn de la prezidanto* kaj la *akton* de la menciita kunsido-asembleo je paĝo naŭa. Mi nun devas diri, ke mi ne konsideras tiun lojalan kritikon kiel atakon, kaj krome, ke ni haleanoj sekvu la ekzemplon de nia prezidanto, plendi pri io ajn, kiun ni ne bonvidas. Mi ne ŝanĝos mian vidpunkton, kaj mi promesas, ke venontnumere mi klarigos mian sintenon, kaj ankaŭ tiun *malblankan aferon*, kial mi eks-sat-aniĝis, kial mi estas dumviva membro kaj vic- kaj fakdelegito de UEA, kaj *tamene* amas mian postenon kiel redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo***, kies vicpatro mi konsideras min.


Ni nun parolu pri tiu ĉi numero de nia revuo. Kiel vi *vidas*, ni jam havas skaneron, kio faros nian organon pli legindan, mi esperas. Ankaŭ ni havas novajn subskribojn, kiel Félix García Rosillo, Vale kaj Franz Kraft, krom niajn fidelajn Giordano Moya, Bernard Golden kaj Olga López. Mi mem verkis artikolon kaj tradukis poemon, kontraŭante mian kutimon ne verki mi mem artikolojn por nia magazino. Tio estas, ĉar la ***Kajeroj*** ne devas esti afero de unu persono, sed ĝi apartenas al ni ĉiuj, kaj ni ĉiuj devas verki kaj subteni ĝin.

En paĝo 12 vi trovas biografion de Bernard Golden, kaj mi invitas al aliaj kunlaborantoj niaj imiti lin, nome: sendi foton kaj biografion por publikigo. Tiel, ni scias kio estas kiu. Sed, kompreneble, tio estas peto, ne trudo. Ni ne estu trudemaj aŭ netoleremaj, kaj respektu unu la alian, kiel la statuto de HALE devigas. Tiusence, vi eble rimarkas la mankon da artikoloj de Isabel Acevedo, kiu eble ne ŝatis la lastan artikolon pri *kastilia aŭ hispana* (K32, paĝo 10). Mi ne kredas, ke ni devas esti ama familio, sed almenaŭ ni povos iĝi aro da alparoleblaj personoj. Eble ni ne havas komunan taskon, sed ni almenaŭ povas profiti komunan interkomprenilon. Ĉu ĝi estas peti tro?

Hodiaŭ oni rigardas kaj kontrolas nin, aŭ almenaŭ tio estas kion Angela Bennet diras en la filmo kiun Franz Kraft recenzas en paĝo 13. Eble vi havas alion por diri pri tio. Mi esperas vian publikigotan opinion. Ĉiuokaze, ĝi estu omaĝo al Laborista Virino, kies Tago oni festis la okan de marton pasintan.

Kaj laste, bonan novaĵon: nian ***Kajerojn el la Sudo*** jam legis pli ol mil personoj en Internet: ĝis la momento kiam mi tajpas tion, la kontilon diras **1600** legojn! Se vi ankoraŭ ne legis nin en la reto, uzu la adreson sur nia kovrilo, kaj sendu vian reagon al ni.

Ĝis la venonta julio, mi kore salutas vin.



**Labormondo**

# Sociala asekursistemo

*Giordano Moya*



Nuntempe politikistoj, ekonomikistoj kaj financistoj plendas pro tio, ke laŭ ili la sociala asekursistemo ne estas subtenebla. Antaŭ ol analizi la ekonomiajn kialojn, ni iom ekzamenu la socian aspekton de la Sociala Asekursistemo.

Estas fakto, ke en nia socio ekzistas riĉuloj kaj malriĉuloj, kleruloj kaj malkleruloj, kaj eĉ oni povas diri bonsortuloj kaj malbonsortuloj, sed neniu individue per si mem povas eskapi al la hazardoj de la vivado. Ĉiu ajn povas malsaniĝi, havi akcidentojn; ĉiu bonsortulo, kiu atingas la maljunecon povas resti senpova kaj eĉ riĉulo povas ruiniĝi.



La kunvivado en socio devas kunporti solidarecon, sen ĝi la socio fariĝas ĝangalo.

Kvankam la sociala asekursistemo estas nek io perfekta nek definitiva, almenaŭ ĝi estas io, kio mildigas la sekvojn de la sovaĝa kapitalismo de la pasinta deknaŭa jarcento.

Nuntempe, pro la industria kaj grandurba civilizacio la perfortaj revolucioj ne povas solvi la socialan problemaron. La ideo de la perfortaj revolucioj naskiĝis pro la defio de la sovaĝa kapitalismo. Hodiaŭ en nia kompleksa socio ili ne povas efiki, ĉar perforta revolucio, se ebla, alportas ĥaoson kaj daŭra ĥaoso kondukas al diktaturoj, tute kontraŭaj al la celo de pli bona socio. Tio nuntempe atingebla estas la perfektiĝo de la sociala asekursistemo ĝis sia transformiĝo en veran socian solidarecon. Nuntempe en la nunaj cirkonstancoj de la civilizacio, malpliigi la socialan asekursistemon alportus por multoj neelteneblajn statojn mizer-riskajn kaj pereon, alportanta krimadon kaj prostituadon.

Post tiuj konsideroj ni ekzamenos la financan aspekton de la subtenado de la asekursistemo.

Oni diras, ke la budĝetoj de la ŝtato ne permesas tiom da elspezoj. La vera kialo kuŝas post tio, ke senzorgema daŭra administrado kun kreskantaj deficitoj atingis la rezulton, ke la trideka procento de la ŝtata budĝeto devas esti destinita por pagi la interesojn de la kapitala prunto, kaj en malmultaj jaroj kun sama administrado alvenos situacio en kiu la tuta budĝeto de la ŝtato devus esti destinata por pagi la prunto-interesojn kaj restos nenio por ĉio alia, ne nur por la asekursistemo. Tio estas, la ŝtato bankrotos.

La unua konsidero, kiun oni povas fari estas, ke ĉio dependas de la kvanto da riĉeco, kiun enhavas la lando kaj de sia distribuo. Se la senlaboruloj aŭ sendungitoj laborus sendube la disponeblaj riĉaĵoj por distribui pliiĝus.

Tial, ke la plena disvastiĝo de la industriiĝo reduktas laboristojn kaj oni ne kapablas aŭ deziras solvi tiun problemon, ĉiuj laborante en la nunaj kondiĉoj sufiĉos por subteni la aktualan asekursistemon kaj eĉ tiun pliigi por elradikigi la mizeron.


Estas multaj kaŭzoj de ruiniĝo de la sociala asekursistemo, sed inter ili la malbona rendimento de la ŝtata administrado kaj ankaŭ la nesufiĉa civitaneco de multaj asekuritoj, sed ni delasu paroli pri civitaneco kaj moralo por nur paroli pri la financa aspekto de nia nuna socio.

La ŝtato emisias prunto-paperojn, la aŭtonomaj komunumoj pruntas al bankoj, la urboj tiel same, la entreprenoj funkcias per prunto-kapitalo kaj eĉ la laboristoj mem pruntas monon por aĉeti loĝejon, meblojn aŭ aŭtomobilon, ktp., ĝis tia grado, ke se oni ne havas sekuran laborlokon aŭ havas la minacon perdi ĝin la risko de ruiniĝo pendas sur ĉiuj kapoj. La manko de sekura laborlokon reflektiĝas en la naskado, kiu restas sub la minimumo por anstataŭigi la mortintojn.

La ĝenerala kutimo vivi pruntante monon alportas la prigrandiĝon de la financa flanko de la ekonomio. La financoj ne apartenas al la produktado, sed al la servoj, kaj ili tendencas tiom kreski ĝis sia transformiĝo en kancero de la ekonomio. Dum kreskas la senlaboreco kaj bankrotas entreprenoj, multaj bankoj havas grandan profiton kaj fifinancistoj per nomataj inĝenieraj financoj arigas imponajn kapitalojn.

Kiel solvi la financan aferon? Ĉu ŝtatigi la bankojn? Centralizi ĉion en la ŝtaton ne donis bonan rezulton, la afero jam fiaskis en URSS. Ripeti alian fojon la eksperimenton kondukus nin al sama negativa rezulto. Pri la financoj, krom pro abundo de kapitalo delasi en la estonteco la ĝeneralan pruntadon kun interesoj kiel socia malsano, ni povas hodiaŭ direkti nian rigardon al la ŝparkasoj. La ŝparkasoj devas apliki la profiton al socialaj aferoj, kiujn kompreneble ricevas la socio. La ŝparkasoj funkcias sub kontrolo de komisionoj el diversa konsisto, multfoje kun partopreno de la urbestraro kaj elektitaj reprezentantoj de la klientoj kaj unu el la venontaj sociaj konkeroj povus esti la partopreno de reprezentantoj de la sindikatoj. La anstataŭado de la privataj bankoj per ŝparkasoj povos redukti la pezon de la financa ŝarĝo, kiu minacas la ŝtaton per bankroto kaj la socion per ruiniĝo. Ĉu la profito de la novaj ŝparkasoj ne povos kontribui en la financado de la sociala asekursistemo?

***Septembro 1996***




## Al Patrino,

*de Edgar Allan Poe*

*Ĉar mi sentas, ke en ĉielo alta,*
*anĝeloj paroletante*

*povas trovi,inter siaj bruliĝantaj amvortoj,*
*neniun tiel ame kiel tiu de* patrin',

*Tial per tiu dolĉa nomo mi vokas vin delonge:*
*Vin, kiu estas pli ol patrino por mi,*

*kaj korigas mian koron, kie morto metis vin*
*Kiam ĝi liberigis la spriton de Virginja.*

*Patrino mia —ĉar mia propra patrino frue mortinta*
*estis nur patrino de mi, sed vi*

*patrinis tiun, kiun mi amis tiel mole,*
*Kaj tio faris vin pli kara ol patrin' kiun mi konis.*

*Per tiu senfineco per kiu edzinon*
*mian amegis mia spirito pli ol sian vivon.*

(To my Mother, *7-an de julio de 1849)*

(Tradukis Jesuo de las Heras)

# Ekologio kaj kaŝloĝado

Kiun rilaton havas movado kiel tiu de kaŝloĝantoj kun la ekologio? Mallonga pripenso gvidas nin de la urboplanado al la neceso kaŝokupi loĝejojn, trairante la solidarecon kaj la ekologion. Tian pripenson oni enkadrigu en la necesan strebon globetrakti kaj integri la problemojn homajn, ekonomiajn, sociajn kaj ekologiajn kiel nedisigeblajn partojn el neŝatiga realo, kreskante maljusta kaj medidetrua.

Jen la propono de ekologia rezonado: ekzistas en la tuta hispana ŝtato granda kvanto da malplenaj konstruaĵoj. Tiu ĉi estas la kazo de Madrido, kie ekzistas ume 150.000 loĝejoj kaj domoj malplenaj. Tie, krome, estas altaj la luprezoj, kaj la dunga nestabileco kreskanta malebligas multojn atingi la familian emancipiĝon aŭ indan domon. Tamen, kaj malgraŭ tiu ĉi subuzado de la konstruaĵaro, estas planite konstrui milojn de loĝejoj kaj siajn koncernajn "infrastrukturojn" (tio estas, landvojoj, elektraj linioj, k.t.p.), kadre de la projektoj konataj kiel Planoj de Urba Agado, kaj ankaŭ de multaj privataj iniciatoj. La ekologia efiko de tiuj ĉi planoj estas evidenta, kaj ili estas speciale nejustigeblaj kalkulinte kun la ega nombro de domoj malplenaj. Estas menciinda la popularismo de la majoritataj sindikatoj, kiuj kuraĝigas la konstruajn kooperativojn. Ankaŭ pri tio oni rimarkas malhavon de ekologia sentemo.



Ekde urboplana kaj ekologia vidpunktoj, estas erare ke oni komencigu novajn konstruaĵojn kiuj plie etendigas la trodimensiajn urbojn kaj kreas pli grandajn transportajn postulojn. La urbo kreskas invadante la spacon ĉirkaŭan kaj estigante novajn retojn transportajn kaj infrastrukturojn. La domkonstruado mem grave efikas la medion, ĉu pro la okupado de spacoj pli aŭ malpli naturaj, ĉu pro la energia elspezo kaj la ĝenerala rimeda elspezo.

La argumento de la dungokreado kiel justigilo por konservi la konstrukvanton nur taŭgas por tiuj, kiuj konsideras la laboron kiel valoro mem kaj volas meti la batalon en erarajn lokojn. Por multoj estas klare, ke la laboro ne estas beno, kaj ne ideale estus labori malpli, eble disdonante la socian malbonon kiun konsistigas tia aktivado, ege bridanta

pro plejparto el la mortebluloj. Estas malmorale fabriki aĵojn nenecesajn, eĉ nenecesajn loĝejojn.

*Malpliigo de konstruoj.*

Ĉiurilate estas menciinda la rolo de la konstrubranĉo kiel motoro de la kapitalisma ekonomio. Ekzistas rilato certa inter la kresko de la ekonomio kaj la evoluo kaj subtenado de la konstrubranĉo. Ankaŭ ne la atingo de tropoporciaj rentoj, pere de luigoj, estus defendebla en modelo socia pli solidara ol tiu nuna. Do, la ekologia propono postulas la malpliigon, kaj eĉ haltigon, de novaj konstruoj dum ekzistas subuzado de la nuna domstoko.

Inter la kialoj de la ekzisto de tiom da malplenaj domoj kaj ejoj oni povas mencii la spekulacion kaj la interesmankon pri la sociaj, homaj kaj ekologiaj profitoj kiuj rezultus de la luigo aŭ vendo de la domoj kaj ejoj malplenaj. La kaŝloĝanta movado estas, iomgrade, kiel politika reago kontraŭ tiu ĉi situacio kaj, iomgrade ankaŭ, neceso disponi de loĝejo. Se la kaŝokupo estiĝas spontanee pro vera neceso,kaj en kolektivoj malsamaj de la kutimaj kaŝokupantoj, la necesa politika strukturiĝo de la movado, aŭ, pli ĝenerale, de la aŭtonoma movado, havas streĉan rilaton kun la kaŝokupado de sociaj centroj. Ĉirilate oni komencas rigardi la okupadon kiel ion socie allogan (ĉefe por la junaj kolektivoj).

Dum la alternativaj kolektivoj ne povas facile disponi de sidejoj, sen la devigo pagi prezegojn, aŭ servute akcepti la interesojn kaj altrudojn de la urbodomoj kaj aliaj publikaj institucioj, estas antaŭvideble ke la movado de okupado de loĝejoj kaj sociaj centroj daŭrigos. La plifirmigo de la leĝo kiu punas la kaŝokupojn nur krimigus kaj pliseriozigus la konflikton. Nur leĝo kiu devigos luigi aŭ vendi la malplenajn domojn kaj ejojn kontribuos plibonigi la vivnivelon de multoj, eviti la ekologian fiefikon de la konstruado de novaj domoj,kaj kuraĝigi la kreivajn aktivadojn el la junuloj solidaraj kaj iliajn iniciatemojn. La reutiligo de forlasitaj konstruaĵoj kiel loĝejoj aŭ sociaj centroj kaj la reciklo, aŭ se oni preferas, la subtenado de la forlasitaj konstruaĵoj, reenmetante ilin en la vivociklon de la socio antaŭ ol la senzorgo detruos ilin, povas resumi la ekologiisman postulon priskribitan en la lastaj paragrafoj.

La ekologiisma sinteno devas esti klara: oni ne konsideras la privatan propraĵon kiel absolutan valoron, kaj tiu ĉi rajto estas subordigenda al la socia kaj media bonstato. La kaŝokupoj estos defendendaj kaj aprobendaj ĉiam kiam ili estas reagoj antaŭ veraj necesoj aŭ kiam oni faras ilin pro politike aŭ socie justigeblaj kialoj. La malutilo al triapartuloj (propraĵohavantoj, k.t.p.), ne estos argumento kontraŭ la okupoj kiam la konstruaĵoj estas dumlonge forlasitaj aŭ prispekulaciitaj. Resume, kaj ree plu, la ekologiisma sinteno estos regata de la tri r-oj: *redukti, reutiligi, recikli.*

Félix García Rosillo,
membro de AEDENAT kaj
kunlaboranto de
Kooperativa Societo ***Página Abierta***

# Ĝenerala Kunsido de HALE

## *La sepan de februaro de 1997.*

Je la kvina horo neniu ĉeestis.

Je la kvina kaj duono (dua kunvoko), ĉeestis Johakimo Periago Rubio kaj María del Mar Guirao Gallego.

Je la sesa horo (tria kunvoko) ĉeestis ankaŭ S-roj José Pina Tuells, Juan Antonio Cabezos Martínez, Kasisto José María Bernabéu Franco kaj Prezidanto Martín Bustín Benito. Poste venis Yolanda Guirao Gallego.

La ĝisnuna sekretario petis parolon antaŭ ol diskuti la punktojn de la tagordo por komuniki al la ĉeestantoj la salutojn el kamarado Antonio Marco Botella, kiu ne venis pro malsano, kaj liajn bondezirojn por sukceso al la Kunsido. Ankaŭ mi informis pri liaj lojalaj kritikoj al la nova ***Kajeroj el la Sudo***, kiuj helpos la redaktoron fari pli bonan revuon.

Ĉar post tria kunvoko ĉiu decido estas laŭleĝa, la kunsidon la Prezidanta Moŝto malfermis oficiale.

**JEN LA DECIDOJ:**

1. ***Reformoj de Statutoj.*** S-ro Pina Tuells proponis ŝanĝi la antaŭlastan paragrafon de la artikolo 10-a de la Statutoj, kiu diras *"La elektoj de la Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto fariĝos inter la membroj loĝantaj en sama urbo kie sidas la Asocio, fakte ili estos la gvida aparato kiu direktos kaj administros la societon"*. Laŭ li, se ĝin oni ne ŝanĝas, la Prezidanto ne povus esti la nuna ĉar li ne loĝas en Callosa, kaj ne povas esti aliaj estraranoj, ĉar nur la kasisto loĝas en tiu urbo. Post rapida baloto, unuanime oni ŝanĝis la paragrafon, kiu ekde nun tekstas tiel: *La elektoj de la Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto fariĝos inter la membroj apartenantaj al HALE dum antaŭ pli ol unu jaro, kaj fakte ili estos la gvida aparato kiu direktos kaj administros la societon.*

Novan paragrafon oni aldonis al artikolo 10, kiu tekstas: *La estraro elektos **Vicprezidanton**, kiun la sekvonta asembleo ĝenerala devos aprobi. Sia ofico daŭros tiel, kiel tiu de la estraro.*

Post la epigrafo ***Koncernas la Prezidanton***, oni aldonis la sekvontan:

**Koncernas la Vicprezidanton**:
a) Anstataŭi la prezidanton,
b) Ĉian alian taskon konsentitan inter li/ŝi kaj la Prezidanto.

Sekve de la reformo pri la sidejo, oni ankaŭ reformis la artikolon 2, kiun oni legis tiel: *La sidejo de la Asocio estas Callosa de Segura (Alicante), strato Gral. Primo de Rivera, 6, kaj ...* Tiu artikolo ekde nun tekstas: *La sidejo de la Asocio estas la urbo kie la Prezidanto loĝas, kies adreson oni trovas je la dua paĝo de la tiama **Kajeroj el la Sudo**.* Tiu permesos nin ŝanĝi Prezidanton sen ŝanĝi la Statutojn.

La ankoraŭa sekretario proponas **senhispanigi HALE**n, tio estas, ke nia asocio estu ekde nun *Asocio de Laboristoj Esperantistaj*, fundamentante sian proponon en la fakto, ke HALE estas nun sufiĉe konata ekster Hispanio, kaj estas multaj kamaradoj kiuj jam manifestis al li sian volon aniĝi la asocion. Tamen, estante nacia asocio, eble ili ne

sentus sin sufiĉe komfortaj. Aldone, oni atingas la bultenon de nia asocio ĉie en la mondo pere de Internet, kaj dum la momento kiam tiu ĉi asembleo kunsidas, 587 personoj jam legis nian bultenon pere de la interreto, plej multe ekster Hispanio. Ankaŭ, ni ĉiuj diras, ke ni estas sennaciaj, kaj tial ne taŭgas, ke nia asocio estas nacia ĉar ĝi estas *hispana*. Ne hispana, nia asocio devus esti monda, ĉar nia sinteno estas tute kultura kaj sennacia.

Sekvis interesa debato fare de S-roj Bernabéu kaj Bustín, kiuj diris, ke por alinaciuloj jam estas SAT; kaj ankaŭ oni asertis, ke mankas sufiĉe da debato por fari tiun gravan decidon. La nuna sekretario **invitis ĉiujn skribi artikolojn por publikigo en nia bulteno** ĉirilate. Post tio, oni balotis tiel:

**Por** la senhispanigo: **du** voĉoj. **Kontraŭ**: **tri** voĉoj. **Ne** voĉdonis: **tri**. Sekve, *Hale* restos **Hale**.

2. ***Elekto de Nova Estraro.*** La sekretario demisiis, kaj ĝin farante li proponis novan estraron por konsidero de la Asembleo:

**Prezidanto**: Martín Bustín Benito, el Alikanto,

**Vicprezidanto**: María del Mar Guirao Gallego, el Lorca (Murcia),

**Sekretario:** José Pina Tuells, el Murcia,

**Kasisto**: José María Bernabéu Franco, el Callosa de Segura (Alikanto),

**Redaktoro** de ***Kajeroj el la Sudo***: Jesuo de las Heras Jiménez, el Murcia.

Unuanime la Asembleo aprobis la proponon, kaj sekve tiu estas la nova estraro. Gratulon al ili.

3. ***Budĝeta raporto, de la kasisto.*** José María Bernabéu Franco diris, ke kotizis nur 33 homoj ĝis nun, kvankam kelkaj kotizis po du jaroj. Nun estas 156.800 pesetoj en niaj kontoj, kio surpasas la limon, kiun ni mem metis en niajn Statutojn (artikolo 14). Oni aprobis aĉeti skaneron por pli bone fari nian revuon, kaj post debato ĉu aĉeti bonan ilon, aŭ eĉ plibonan kostante duoble, oni finfine aprobis aĉeti HP P4 skaneron, kiu kostas proksimume 80.000 pesetoj. Tio malaltigos nian budĝeton sub nia agnoskita memlimo de 90.000 pesetoj. Ankaŭ la kvalito de la ***Kajeroj el la Sudo*** pliboniĝos ekde la venonta numero, ĉar oni faros ĝin en pli bona presejo.

La sinjoro kasisto insistis, ke la kotizantoj devas **ricevi kvitancon de la pago**, sed kostas multe da mono presi ilin. La redaktoro de la magazino promesis fari tion kaj sendi kvintancojn —laŭ informo de la kasisto— ene de la magazino. Tiu kostos nenion kaj garantios la rajton de la paginto al pagprovo.

Laŭ peto de la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo***, oni aprobis unuanime, ke la anoj el Afriko kaj Azio devos pagi nur duonon de la kotizo. Tio ne signifas pliigo de la kotizo de la resto el la mondo, kies kotizo ankoraŭ estos mil pesetoj, aŭ samvaloro en fremda devizo. Se estas malfacile sendi monon el fremdio, oni povas sendi la monon pere de afrankilo aŭ en la loka deviza bileto enkovertita en registrita letero. La kotizon oni devas nepre sendi al la Kasisto, kies adreso estas ĉe la dua paĝo de la lasta ***Kajero el la Sudo***.

4. ***Demandoj kaj proponoj.***

1 La Sinjoro Prezidanto manifestis, ke samideano Vicente Hernández Llusera plendis, ke li ne plu ricevis la revuon antaŭ unu jaro. La redaktoro diris, ke antaŭ unu monato li sendis al li la kvar lastajn numerojn, kaj ankoraŭ esperas li agnoskon de ricevo. Aldone, la poŝto

resendis kelkajn magazinojn ĉar siaj adresoj ne estas akurataj. Bonvolu estu paciencaj la samideanoj, kaj sendi al ni la novan adreson, ĉar alimaniere ni ne povos atingi ilin.

2 ***Lea-ligilo*** eldonita de Alan Gould: en la lasta kongreso oni konsentis ekfari komunan ligilon inter-lea. La Prezidanto legis la artikolon *Bonvenon al itala LEA!*, presita ĉe tiu ligilo, kaj substrekis, ke estas interesa, ĉar ni povas interŝanĝi ideojn.

3 En la pasinta kunveno de HALE la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo*** demandis pri al kiu oni devos sendi la revuon, ĉar ne ĉiu ricevanto pagas la kotizon. Oni devas nepre sendi ĝin al ciuj laboristaj esperantaj asocioj (LEAoj). La redaktoro diris, ke li ĝin jam sendas al ĉiuj kaj ankaŭ al aliaj revuoj esperantaj kiel revuan interŝanĝon. Krome de la pagintojn, oni devas ankaŭ sendi kelkaj ekzemplerojn al aliaj samideanoj por promocii la revuon, laŭ la kriterio de la redaktoro. Kio ne estas defendebla estas, ke pagas 33, sed la revuon oni sendas al 500 homoj!

4 **S-ro Pina** manifestis, ke nepras starigi strategion por varbado kaj pliigo de la influo de nia revuo kaj asocio. Kiamaniere ni pliigos la nombron? En Hispanio troviĝas potencaj interesuloj ĉe maldestraj movadoj. La strategion oni devas plani. Alia afero estas tion fari: kion konkretan rimedon oni havas? La Prezidanto respondis,ke estas kelkaj gravaj intelektuloj, sed ankaŭ manifestis, ke li opiniis, ke Esperanto venkos kiam la simpla popolo ĝin uzas. La intelektuloj povas lerni Esperanton per si mem, kiam ili volos. Li tiam proponis gvidi kursojn en sindikatejoj kaj aliaj laboristaj etosoj.

Antaŭ ol fermi la Kunsidon, la Prezidanto anoncis, ke estos Kunsido en Benidorm baldaŭ, kaj ke oni povas peti aldonon de punktoj por diskuto en la tagordo publikigota en ***Kajeroj el la Sudo***.

Je la oka horo de la 7-a de februaro de 1997 fermis la kunsidon la Prezidanto renovigita, S-ro Martín Bustín Benito en la Kafejo *Candela*, de Murcia, Avdª Juan Carlos I, 24, 30008 MURCIA.

*La sekretario,*

*Jesuo de las Heras*

*Bonvidita, La Prezidanto,*

*Marteno Bustín Benito*

## Administro:

**Ni serĉas** la sekvantajn kamaradojn, kies ekzemplerojn de ***Kajeroj el la Sudo*** la poŝto ripete resendas al ni pro netaŭgeco ĉe ilia adreso:

1 Silvia González, el León (Hispanio),
2 Nacia Konfederacio Laboro, el Tolosa (Francio), kaj Alicante (Hispanio),
3 Tage Peterson, el Altea (Hispanio),
4 Dro Rainer Noltenius, el Dortmund (Germanio),
5 Claude Rouget Verdiere, el Tromso (Norvegio),
6 Krys Long, el Bracknell (Britio),

Ni petas al ĉiuj samideanoj, ke kiam ili ŝanĝas sian adreson, bonvolu informi nin, ĉar sendi kaj resendi la revuon kostas monon, kaj kaŭzas malĝentilan senton ambaŭflanke. Krome, se iu kamarado scias pri la malaperintaj samideanoj, bonvolu informi al ni. Koran dankon al vi ĉiuj.

*La redakcio*

# Biografiaj donitaĵoj pri Bernard Golden



Mi naskiĝis en Newark, Novĵerzejo, Usono, la 23-an de novembro de 1925. Dum multaj jaroj mi loĝis ĉe la urbo Novjorko, kie mi frekventis lernejojn kaj universitatojn. Mi studis fremdajn bakalaŭran universitatan diplomon en 1946. Post normaj studoj pri antropologio kaj arkeologio, mi estis diplomita kiel magistro en 1953.

Mi eklernis Esperanton en 1946 en Novjorko kaj *edzesperantistiĝis* en Hungario en 1971. Miaj du filoj, Daniel Lariko kaj David Alko, estas esperantistoj.

Mi estas dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio kaj funkcias kiel fakdelegito en Veszprém pri arkeologio, esperantologio kaj interlingvistiko. Mi estas membro de Akademio de Esperanto kaj okupas la postenon de direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro.

Post la fino de miaj universitataj kursoj en Usono, mi entreprenis post-diplomajn studojn en Meksiko, Anglio, Francio, Hispanio kaj Italio. Mi laboris kiel arkeologisto en la ĉi-supre menciitaj landoj kaj ankaŭ en Gŭatemalo, Svedio, Orient- kaj Okcidentafriko kaj Hungario. Inter 1975 kaj 1995 mi oficis kiel arkeologisto, muzeologo kaj bibliotekisto ĉe la Muzeo de Bakony en Veszprém, Hungario, ĝis mia emeritiĝo en 1985.

Nuntempe mi dediĉas min preskaŭ ekskluzive al beletra kaj faka verkado en Esperanto kaj jam kontribuis al pli ol 160 esperantaj periodaĵoj publikigitaj dise en la mondo. Pluraj miaj verkoj estis premiitaj en internaciaj belartaj konkursoj, kaj mi fariĝis Majstro de Internaciaj Floraj Ludoj. En 1988 Hungara Esperanto-Asocio honoris min per la memormedalo *Pro Esperanto* pro altnivelaj literatura kaj interlingvistika agado.

De 1969 ĝis la nuna dato aperis pli ol 1800 artikoloj, studaĵoj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukaĵoj. La plej granda parto konsistas el pritraktoj de lingvaj demandoj. La dua grava temo rilatas al la historio de la Esperanto-movado. En la sfero de beletro estas originalaj noveloj kaj unuaktaj teatraĵoj, feljetono, tradukaĵoj de hungaraj noveloj (kunlabore kun mia edzino Eva) kaj esperantigoj de afrikaj popolrakontoj. Verkoj kaj studaĵoj pri interlingvistikaj kaj planlingvistikaj temoj estis publikigitaj ankaŭ en la angla lingvo en ne-esperantaj fakrevuoj.

*Bernard Golden*

# Ĉu Gonçalo Neves ankoraŭfoje faris mave mizeran mispaŝon?

Bernard Golden

## *Al hirudo ne sufiĉas nur aludo; ja bezonata estas ankaŭ erudo.*

En sia peco titolita *Pri skatologio kaj alio* (*Kajeroj el la Sudo* n-ro 27, 1995, pĝ. 7-8) portugalo Gonçalo Neves faras fiŝe fuŝan kaj debile feblan provon defendi la riproĉendajn aspektojn de la lingvouzo de la venezuela esperantisto Fernando de Diego. Estas nekompreneble, kial tiu lisbonano denove eniris la arenon de publika polemikado post la drasta disbatado de liaj argumentoj, kiam la unuan fojon li surmetis la talaron de advokato por pledi favore al la malverda renegato Kabe[1]. Mi tiutempe publikigis artikolon por demonstri sen nubo de dubo, ke tiu prototipa kabeinto kompilis vortaron kun leksikografie neakcepteblaj difinoj[2]. Poste mi trakribris la enhavon de *La Faraono*, romano elpoligita de tiu sama Kabe, kun la celo kompari lian uzon de la prepozicioj *de* kaj *per* post pasiva participo. Per pluraj trafaj citaĵoj mi montris, ke Kabe estis senespere konfuzita, ĉar en identaj kuntekstoj li kaprice skribis jen *de* jen *per*[3]. Mi pensis, ke la prezentado de tiuj plene dokumentitaj atestiloj povos konsistigi nerefuteblan pruvon pri kritikindaj trajtoj de la lingvouzo de Kabe, kaj pro tio Neves estos facile konvinkita pri la vaneco de sia puse pisa apologio de la tradukinto de *La Faraono*, kaj sen pluaj pepoj li prudente retiriĝos. Tamen, pro iu stranga kialo venis en la kapon de Gonĉjo Neves la ideo refoje rampi en la forumon de publika opinio. Tirante kun si la jam polvokovritan kaj plurloke flikitan talaron, li ĉi-foje rolis kiel proparolanto de Fernando de Diego, kiu lastatempe estis metita sur pilorion fare de pluraj esperantistoj.

## *Kulo el Karakaso furzetas, dum elefanto muĝe trumpetas.*

Ankaŭ mi kontribuis al tiu kontraŭdiega kampanjo por riveli la nekontentigan lingvoscion de la karakasano. En unu el miaj artikoloj mi montris, ke la neologismo *palefreno*, kiun de Diego ekuzis en sia traduko de la romano ***Don Quijote***, ne estas akceptebla, ĉar li kreis ĝin sen observo de la principoj de maksimuma internacieco gvidantaj la laboron de planlingvistoj. La ĝusta formo de tiu vorto estas *palafreno*[4].

La sekva ekzemplo de malaprobenda lingvouzo temas pri mistranĉado de Esperantaj vortoj por akiri antonimojn. Kiam de Diego elhispanigis la romanon ***Cent Jaroj da Soleco***, okazis al li krak' en la kap', kaj li elcerbigis la vorton *glekti* per amputado de la silabo *ne* en *neglekti*. Lia celo estis doni al *glekti* la signifon de *zorgi*, kiu estas la antonimo de *neglekti*. Nu, kial je la barbo de Bofront li ne uzis *zorgi* en sia traduko? Mi verkis du artikolojn kondamnantajn tiun atencon kontraŭ la lingvo[5]. Tio havis malbonan efikon sur la kulon el Karakaso.

Venĝocele li sendigis al mi, kun la kompliceco de Reinhard Haupenthal, vitriolplenan leteron, kiu estis kruda konfeso, ke li tute ne kapablas toleri kritikojn pri sia devia lingvouzo. Fine de tiu fi-litero estis la du vortoj *Ice via*. Nu, kiu nun komprenas, kiel funkcias la aberacia vortmutilada pensmaniero de de Diego, ne havos malfacilaĵon deĉifri la enigman esprimon. *Ice* devenas de la vorto *malice* post sensenca buĉado fare de de Diego. La du vortoj, *glekti* kaj *Ice,* estas la rezulto de forigo de la respektivaj unuaj silaboj *ne* kaj *mal*, kiuj etimologie kaj semantike havas neniun rilaton kun la adverbo *ne* kaj la prefikso *mal*.

Iu ajn, kiu volas imiti la mensajn akrobataĵojn de de Diego, povas ekzerci sin per simila silabo-dishakado. Jen kelkaj ekzemploj. Se *Nederlando* laŭ ***Plena Ilustrita Vortaro*** (PIV) estas *eŭropa lando inter Germanujo kaj Belgio*, la loknomo *Derlando* devas esti lando ***ekstere*** *de Germanujo kaj Belgio*. Kaj logike sekvas, ke *derlandanoj* estas sinonimo de *eksterlandanoj*. Nu, kion oni diru pri la nova etna termino *gro*? Ĝi devas temi pri homo nenigra, t.e., la kontraŭo de *negro*. Laste kaj tute balaste, ni eksperimentu per *mal* vorto laŭ la modelo de *malica/ica*. PIV informas, ke *malvazio* estas *dolĉa greka vino*, do *vazio* devas esti **mal**dolĉa greka vino! Lingvistoj sendube reagos negative rilate la bizaraĵojn, kiujn kreas la venezuelano, sed poetoj plej verŝajne havos *gativan* opinion pri lia kreiveco.

De Diego mispaŝis trian fojon, kiam en recenzo en ***Venezuela Stelo*** li hontinde malkovris sian nescion de la esperanta vorto *skatologio* kaj rivelis miskomprenon de la etimologioj de du malsamdevenaj hispanaj vortoj havantaj la ***saman*** ortografion *eskatologio*[6].

## *Se fremda la fako, restu ferma la faŭko*

Nu, kiel estas eble klarigi, kial Gonĉjo Neves tiel obstine okupiĝas pri la defendo de homoj kiel Kabe kaj de Diego? Argumentado ne estas la metio de tiu lusitanido. Li similas al advokataĉo, kiu, per sia nekapablo, certigos, ke sia kliento atingos la pendumilon. Ĉu Gonĉjo ne konstatas, ke ne valoras pledi por la sudamerikano? Don Fernando ne estas DI-EGO sed nur pita di-eto kun kruroj el argilo.

## NOTOJ.-

1. *Ni ne omaĝu al apostato!* ***Monato,*** oktobro 1989, pĝ. 20.
-*Malfruiĝinta plendo* (rehonorigo kaj pardonpeto - gvd). ***Monato***, julio 1992, pĝ 7.
-*La faraona malbeno el la antikva Egiptujo/ Egiptio.* ***La Kancerkliniko***, n-ro 53, 1990, pĝ. 18-19.
-*Kial Kabe fariĝis renegato?* (Ĉapitro el la ukronia historio de la Esperanto-movado). ***Skeptro***, n-ro 3, 1994, pĝ. 17-20.

2 *Aŭtodafeo por la vortaro de Kabe!* ***Nia Bulteno***, novembro-decembro 1991, n-ro 54, pĝ. 18-19.

3. *Kial Kabe konfuziĝis pri la uzo de* de *kaj* per. ***Kajeroj el la Sudo***, n-ro 20, 1993, pĝ. 17-19.

4. *La malĝusta formo de la neologismo* palefreno. *Metodologia studaĵo.* ***Esperanto en Skotlando***, 1988, n-ro 147, pĝ 19-21. Publikigita ankaŭ en: ***The Worker Esperantist***, n-ro 354, julio-aŭgusto 1987, pĝ. 61-62 (mallongigita versio).

5 *La kazo de la mistranĉita neologismo* glekti. **Esperanto Skotlando**, *1987, n-ro 142, pĝ. 19-21. Publikigita ankaŭ en* **The Worker Esperantist**, *n-ro 354, julio-aŭgusto 1987, pĝ. 61-52 (mallongigita versio).*

6 *La diferenco inter* eskatologio *kaj* skatologio. ***Kajeroj el la Sudo***, n-ro 25, 1995, pĝ. 16-19.

# La reto, aŭ la defio de la novaj teĥnologioj

*Nia tuta mondo sidas sur komputilo. Ĝi estas en komputilo. Ĉio, veturilhistorioj, socisekureconumeroj, kreditokartetoj, raportoj pri ĉies malsanoj. Ĉio estas tie. Ĉiuj estas registritaj tie. Estas kvazaŭ elektronika ombro po ĉiu el ni..., kaj ĝi invitas al manipulado! Kaj ĉu vi scias?, oni faris tion al mi. Kaj ĉu vi scias?, oni faros ĝin nepre al vi!* Tiel plendis Angela Bennet, komputilsistema analizisto, en la minuto 78-a de la filmo ***The Net*** (la reto, de Irwin Winkler, 1995). Kaj terure estas, ke ŝi verŝajne pravas! Ĉiuj niaj konitaĵoj estas ene de komputiloj hodiaŭ, kaj ni eĉ ne scias tion: niaj bankoj, nia estraroj, niaj kluboj..., komputoscienco donis komputilon al ili ĉiuj, kaj oni ne ĉiam scias kion fari per ili.

Iloj estas tiuj maŝinoj, vidende, kaj nenio pli. La sola afero kiun ili povas fari estas komputi, tio estas, konti nombrojn, kaj eĉ nur nulojn kaj unuojn. Sed oni konsideras ilin kiel maĝiajn objektojn, modernajn talismanojn, aĵojn kiuj pensas. Neniu konsiderus, ke pistolo —ekzemple— estas malbona, ĉar ĝi pafmortas homon, sed malbonulo faras tion per ĝi. Sed male, oni diras, ke komputilo *eraras* kaj fuŝas la laboron. Ĉu tiuj maŝinoj pensas anstataŭ siaj manipulantoj? Oni diras, ke jes, sed samtempe oni scias, ke ne. Videme, diri estas pli ol scii!

En ***La reto*** oni vidas kiel Angela, vivigita de Sandra Bullock, hazarde



trovas sekretan programon desegnitan oficiale por protekti databazojn, sed fakte ĝi ebligas atingi ilin kaj ŝanĝi konitaĵojn; kaj tiel la malbonulo, Devlin, ŝanĝas la tutan registron pri Angela, igante ŝin Ruth Marx (amuza familinomo en Kapitalujo, ĉu ne?), putino, rabisto, mensogulino, ekskarcerigita, ktp!

Ĉu tio povus okazi hodiaŭ? Eble. Ne estas facile, sed ne estas neeble. Maŝinoj restas nur maŝinoj, kaj komputiloj estas nur iloj kiuj ebligas nin fari la aferojn kiujn ni kutime jam faris, sed multe pli rapide. Sed negravante kiel rapide, komputiloj povas fari nur tion, kion homoj igas ilin fari. Hal, la grandega komputilo en *2001, spaca odiseo*, de Stanley Kubrick, havis programon faritan de homo instruante ĝin mortigi tiujn, kiuj minacus la mision kiun ili havis. Tial Hal ne respondecas pri la mortoj de la spacistoj pli ol la armiloj de gangsteroj. Ni scias, ke ĉiu programo komputila havas *malantaŭan pordon*,tio estas, enirejon por ke sia programinto

poste povu atingi la internan kodon kaj tiel eblos ŝanĝi tion, kio kaŭzas neantaŭviditan malfunkciadon. Leĝoj malpermesas,ke tiun enirejon oni povas uzi aliintence, sed ekzistas krimuloj ĉie, eĉ en komputilio. Multaj homoj eniras sistemojn de komputiloj kontraŭleĝe kaj ekhavas informon rezervitan. Ĉu vi neniam ricevis propagandon ne petitan?

Interreto estas, baze, komputiloj ligitaj per telefonfadeno. Oni uzas ĉefe optikan fibron, sed ankaŭ la telefonsistemo, per kiu kutime oni atingas la optikofibran sistemon. Ĉar ni ĉiuj havas telefonon, iu ajn povas atingi la reton. Oni devizis programojn kies celo estas diveni pasvorton por eniri la reton, kaj tio estas granda problemo por servistoj de Internet. Kutime ili uzas pasvorton apartenantan al konkreta uzanto de la reto. Se la pasvorto estas tiu de zorganto de sistemo, la krimulo povas malutili multe, eĉ ŝanĝi gravajn konitaĵojn, kiel Devlin faris en ***La reto*** pri la informo pri Angela Bennet. Kompreneble, ne kutime juna virino rilatas al neniu ajn kiu povas atesti pri ŝia vera identeco, kaj tiusence la filmo troigis la dramismon. Sed ankoraŭ vi povus esti arestita de la polico pro falsa polica registro kiun policanoj atingis el sia veturila komputilo, kaj eĉ se finfine vi povus klarigi ĉion, vi povus esti enkarcerigita estante senkulpa. Kaj tio estas terura!

Teruriganta estas la sinteno de la advokato de Angela Bennet, kiu ne



kredas ŝin: komputiloj ne eraras, laŭ la lerta leĝistino. *Oni ne povas manipuli ilin*. Videble, tio estas stultaĵo de fakisto kiu, pro kutimo, kredas, ke ŝi ankoraŭ fakas kiam ŝi parolas pri io ekster sia fako. Kaj tiu klera malspriteco komplicas kun tiuj maljustaj situacioj kiel tiuj, kiujn ni vidas en la filmo. Se oni ne vidas la problemon, oni ne povas solvi ĝin.

La filozofio de la filmo estas, ke ni loĝas en ĝangalo, kaj nur ĉar Angela Bennet estis pli bona retisto ol malbonula Devlin kaj la vera Ruth Marx, ŝi povis rehavi sian veran identecon kaj denunci la supermalbonulon, Gregg, plejsupera perfidanto.

Sed la programon *Gatekeeper* (pordogardisto) ne uzis komputisto, sed krimulo kies celo estis nur havi monon. Lian mastro ordonis lin falsigi informojn, kaj sekve li faris tion. Lia mastro ordonis lin mortigi Angela-n, kaj sekve li klopodis fari tion. Malfeliĉe por li, ŝi estis tro inteligenta, kaj ankaŭ sciis pri fajrarmiloj, ŝipetoj, kaj kuris rapide, kiel heroino por infanoj kutime faras!

Finfine, mi diros, ke mi ŝatis la aktorinon, sed kvankam mi ne kredis la finon de la filmo, bedaŭrinde mi ja kredis, ke la faktoj rakontitaj tie povas okazi, se ili ne okazas jam. George Orwell jam diris tion en sia majstra verko ***1984***, kiam li difinis kaj denuncis la *duoblan lingvon* kiun ni suferas hodiaŭ, kiu ne solvas problemojn de gemalplimultuloj, sed pacigas la mensojn de la diskriminantuloj. La temo de la filmo estas nek Internet, nek komputiloj. Ĝi temas pri kafkismo, gestapismo, kaj la sendefeno de individuo antaŭ sistemo ia ajn. Ĉu ni zorgos pri tio?

*Franz Kraft*

Anonime:

# Kio infano estas




Infanoj venas en grandoj, pezoj kaj koloroj variitaj. Oni trovas ilin ĉie: supre, sube, grimpantajn, pendigantajn, kurantajn, saltantajn...

Ilin patrinoj amegas, infaninoj malamas, fratinoj malametas, kaj pligrandaj gefratoj toleras, plenkreskuloj malkonas, kaj ĉielo protektas.

Infano estas vero kun malpura vizaĝo, saĝo hartufaĉiĝita, espero estonta kun rano enpoŝigita.

Infano havas ĉevalan manĝemon, digeston glavglutistan, atombomban energion, scivolon katan, pulmon diktatoran, julesvernan imagecon, violan timecon, senzorgon ŝtalkaptilan, entuziasmon fajrartifikan.

Ili ĝuegas dolĉaĵojn, tranĉiletojn, segilojn, kristnaskojn, librojn bildajn, filon de najbaroj, la kamparon, akvon (je sia natura esto), grandajn bestojn, trajnojn, dimanĉajn matenojn kaj ĉarojn estingistajn. Ili malŝatas vizitojn, doktrinon, lernejon, librojn senbildajn, muziklecionojn, kravatojn, barbirojn, knabinojn, surtutojn, plenkreskulojn kaj enlitiĝhoron.

Neniu ajn fruas plie, aŭ sidas ĉe manĝtablo tiel malfrue. Neniu ajn povas enpoŝigi plumingon oksidan, morditan frukton, duonmetron da fadeno, malplenan saketon por tabako, du dolĉaĵojn, ses centonojn, ŝtonĵetilon, pecon da malkonita substanco, kaj veran ringon supersonan kun sekreta parto.

Infano estas magia kreitaĵo. Vi povas fermi al li la pordon de tiu ĉambro kie vi gardas viajn ilojn, sed vi ne povas fermi al li la pordon de via koro. Ilin vi povas ekspeli el via studĉambro, sed ne el via menso. Ĉia povo via kapitulacas antaŭ li: li estas via karcergardisto, via mastro, via estro.

Li estas eta bruaro, kun vizaĝo malpura. Sed kiam vi atingas la hejmon je la nokto, viaj esperoj kaj ambicioj peciĝitaj, li povas resanigi ĉion per du maĝiaj vortoj: *saluton, paĉjo!*

*Originalo anonima ricevita el Kolombio.*

*La bildo estas desegnita de **Wilson Lôpez**, kolomba infano.*

# Libroservo

La libroservanto de HALE, kamarado Nikolao Gil Carballo, informas, ke la sekvanta listo de *Verkoj de André Cherpillod* estas mendebla ĉe li:

1 ***La aglutinaj lingvoj kaj Esperanto:*** la strukturo de la aglutinaj etnolingvoj, kun multaj ekzemploj (hungaraj, finnaj, turkaj, japanaj, ktp). Komparo kun la strukturo de Esperanto. Memeldono, 1988, 24 paĝo ................................ 600 ptj.

2 ***La Dioj de Izraelo:la vera naturo de la biblia dio.*** La dio de la Biblio havas nenion komunan kun la instruo de la kateĥismo. Memeldono, 1990, 24 paĝoj ........................................ 600 ptj

3 ***Glozel kaj la prahistoria skribo.*** La plej fama kaj plej skandala arkeologia afero en la jarcento. Pruvoj de la ekzisto de skribo en la epoko neolitika kaj eĉ en la paleolitika. Memeldono, 1991, 134 paĝoj. ...................................... 2250 ptj.

4 ***Kaj la suno haltis... Katastrofismo en la folkloro de la popoloj.*** La eksterordinaraj eventoj de la Biblio klarigitaj dank' al la folkloraj tekstoj de la aliaj popoloj. Memeldono, 1993, 74 paĝoj ............... 1350 ptj.

5 ***Historio de la ciferoj.*** La bazoj 10, 12, 2, 5, 8, 60. La ciferoj ĉe la egiptanoj, sumeranoj, babilonanoj, grekoj, hebreoj, ĉinoj, ktp.) Memeldono, 1992, 122 paĝoj ............................... 750 ptj.

6 ***Po, la diabla vorto.*** Studo pri la malfacila prepozicio **po**. Memeldono, 1996, 20 paĝoj ....................... 525 ptj.

7 ***Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo.*** Teorio de la esperanta vortfarado. Memeldono, 1996, 56 paĝoj, .............. 1050 ptj.

8 ***La zamenhofa radikfarado.*** La reguloj, kiujn L.L. Zamenhof sekvis, ne formulante ilin, en la kreado de la esperanta leksiko. Memeldono, 1990, 32 paĝoj ....................................... 750 ptj.

9 ***Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio.*** La albigensa doktrino, la krucmilito kontraŭ la albigensoj, la terura Inkvizicio. Memeldono, 1996, 36 paĝoj ................ 750 ptj.

10 ***Le Plessis-Bourré et l'alchimie, le Plessis-Bourré kaj alĥemio.*** Priskribo de la kastelo kaj de sia fama hermetika plafono, biografio de Jean Bourré kaj mallonga historio de alĥemio. Dulingva. Memeldono, 1993, 40 paĝoj .................................... 900 ptj.

11 ***Historio de la universala lingvo Volapuko.*** *La Jenotem Valemapüka Volapük*, de Johann Schmidt, esperantigita de Philippe Combot, 1996, 54 paĝoj ............... 1125 ptj.

ANKAŬ DISPONEBLA la ***Lirikaj perloj de Al-Andalus***, de Antonio Marco Botella .......................... 1900 ptj.

Ĉiuj mendeblaj el Nicolás Gil Carballo **LIBROSERVO DE HALE, Ap. 305, 24080 León, Hispanio.**


# Debatindaĵoj

## Dudek ses kutimaj demandoj pri Esperanto kaj siaj respondoj

*Kutime geesperantistoj devas senofendiĝi kiam ili aŭdas stultaĵojn pri Esperanto. Ni jam respondis la dek du unuajn demandojn, kaj nun respondas al la sekvantaj tri. Se vi havas aliajn respondojn, ni ege ŝatus ekkoni ilin, por ebla publikigo.*

### *13. Kie oni povas lerni Esperanton?*

Ĉie en la mondo. **La Universala Esperanto Asocio** (UEA), kies sidloko estas en Rotterdam (Universala Esperanto—Asocio, Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweb 176, NL—3015 BJ Rotterdam, The Netherlands), ĉiujare eldonas libreton kiu enhavas adresojn de siaj delegitoj kaj naciaj asocioj en ĉiu lando el la mondo, kaj vi povas demandi ilin. Ankaŭ estas kelkaj kursoj pri Esperanto en Interneto —eĉ estas unu en Esperanto España, la TTT paĝo kie ***Kajeroj el la Sudo*** aperas ekde la numero 29!—, kiun vi trovos facile. Tamen, se estus problemo, vi ankaŭ povus sendi mesaĝon al mi per *Internet* (jesuo@mur.hnet.es) aŭ al tiu ĉi poŝta adreso: Jesuo de las Heras, Apartado 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO, kaj mi diros al vi la plej rapidan manieron kontakti instruiston pri Esperanto.



Se vi preferas lernigi vin mem kaj vi regas la hispanan, estas bonega libro verkita de S-ro Félix Navarro Clemente, el Valensjo (Hispanio), kiun akompanas kvar kasedoj kaj estas malmulte kosta (ĉirkaŭ dek usonaj dolaroj) kaj kies nomo estas ***Curso práctico elemental de Esperanto***. Iom pli kostas la kurso ***Ĉu vi audis ke..?***, de Katalin Smidéliusz (Hungario), ankaŭ enhavante kasedon, kaj kompreneble por studi kiel duan kurson, ĉar estas verkita nur en Esperanto. La plej uzata libro por lerni Esperanton estas ***Junulkurso***, de nekonata aŭtoro, sed eldonita de SAT Amikaro, kaj atingebla de la libroservo de HALE (same kiel ĉiu aliaj menciitaj libroj). Se vi regas la anglan, estas tre bona libro eldonita en Britujo, en la serio *Teach Yourself Books* (libroj por instrui al vi mem), kaj la sama firmao ankaŭ eldonas dulingvan vortaron angla-Esperanto, Esperanto-angla kompilita de D-ro John Wells, eksprezidanto de UEA kaj profesoro pri fonetiko ĉe Universitato de Londono (Britujo). Ankaŭ estas duvoluma kurso de Esperanto por angloj, skribita de Markarian kaj Sullivan kaj mendebla ĉe la Esperanto Asocio de Britujo (Esperanto Association of Britain, Esperanto Centro; 140, Holland Park Avenue, London W11 4 UF; telephone: (0171) 727 7821). Vi ankaŭ povas peti ilian bultenon, *Ligilo*.



Kiam vi jam regas iom Esperanton, vi povas peti rekte al mi numeron de ***Kajeroj el la Sudo***, kiu estas tre bona eldonaĵo por praktiki la lingvon. :-) Ankaŭ, mi konsilas al vi ***Kontakton***, revuo por gejunuloj. Sed ĉiukaze, vi povas atingi ***Kajerojn el la Sudo*** rekte ĉe la adreso http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.html tute senpage.

Krome, estas multaj aliaj kursoj en Internet en la franca, germana, nederlanda, angla, sveda kaj hispana.

Se vi volas plian informon pri tio, vi povas konsulti la esperantan ĉefan paĝon de la Universala Esperanto Asocio en Rotterdamo, http://www.iwe.com/esperanto.

### *14. Esperantisto sonas simile al* adventisto *aŭ* spiritisto..., *ĉu Esperanto estas sekto?*

Kompreneble, ke ĝi sonas tiel! :-) Sed ambaŭ ankaŭ sonas kiel *analisto, anarĥiisto, ĵurnalisto* kaj *fakisto*, krome de *murdisto, rabisto, idealisto, plumbisto* aŭ *kuracisto*! :-) Esperanto neniam estis sekreta societo kiel framasonoj aŭ Rozkrucanoj, sed malfermita al ĉiuj. Multaj esperantistoj estas tre religiemaj, sed aliaj estas ateistoj. Ni ne povas klasifiki esperantistojn kiel solinteresan aron, kiel ŝakludantojn aŭ kolektantojn de stampoj, sed ni estas mozaika aro da personoj kies nura komuna intereso estas ĝuste sia deziro komuniki ion —eĉ se tiu *io* estas tute nekomuna—. Kelkmaniere, ĝi similas al radioamatoroj, sed kun la diferenco, ke ni emas esti pli objektivaj ol ili pri lingvoj.

### *15. Kiuj estas la esperantistoj. Kio estas ili?*

Ni estas personoj el ĉiu socia kaj kultura nivelo. Kelkaj estas membroj de la Universala Esperanto Asocio, aliaj estas anoj de naciaj aŭ internaciaj federacioj (eĉ estas *sen-nacia* asocio, SAT, kio volas diri *Sennacia Asocio Tutmonda*) de Esperanto. Estas ankaŭ esperantistoj kiuj ne aniĝis iun klubon aŭ asocion. Tial estas tiom malfacile scii la ekzaktan nombron da ni. En 1966 ili kunmetis 70 milionojn da subskriboj el la tuta mondo por peti la Unuiĝintajn Naciojn, ke oni adoptu Esperanton kiel oficialan lingvon (kiu estus la oka), sed la Ĝenerala Sekretario, S-ro U-Thant, montrante kiom malmulte demokratia tiu ofico povas esti, refuzis baloti la aferon.




Krome de tiuj asocioj, estas aliaj pli fakiĝitaj, sed ankoraŭ tutmondaj: filatelio, verkistoj, fervojistoj, ateoj, muzikistoj, poetoj, katolikoj, historiistoj, matematikistoj, filozofoj, radioamatoroj, astronomio, instruistoj, kaj multaj pli. La plejmulto eldonas siajn magazinojn kaj havas internaciajn apartajn kongresojn en Esperanto.

*Daŭrigota de*
*Olga López*

# ESPERANTO, aparta muzika sperto

*Kiam mi aŭdis, ke Hispana Warner eldonigis diskon kompakton esperantan, kaj ke ĝi eĉ nomiĝis tiel, Esperanto, mi kuris al murciaj diskovendejoj por aĉeti ĝin. Tamen, radia kaj televida averto antaŭeniris la komerciistojn je pli ol du semajnoj. Nun, mi aŭdas ĝin ĉe la sama komputilo kie mi verkas ĉi-artikolon pri miaj impresoj pri la afero...*





Fakte, mi reverkas la artikolon, kiu aperis jam ĉe numero 3 de *El Correo del Esperanto*, hispane verkita. Kontraŭas mian ĝisnunan kutimon pri ne verki opinian artikolon ĉe la revuon kies redaktoro mi estas, sed ĉar mi legis du artikolojn pri la disko en magazinoj de la esperanta *movado*, mi ŝatus klarigi mian vidpunkto al la resto de la mondo.

Unue. mi devas diri, ke ne estas kantoj pri aŭ de *la esperanta movado*, feliĉe, sed mi revenos pri tio poste. Ankaŭ, ne estas *originalaj* muziktemoj, kion mi ja esperis.

La etoso kiun la muziko vokas ne estas orienta aŭ okcidenta, sed miksaĵo el ambaŭ: la ĥorkantoj havas unuvoĉan melodion, kiel kutimas orienta muziko, sed abundas maŝina, popola akompano, je la vojo aperigita de Waldo de los Ríos, kiu je la fino de la sesdekaj jaroj famigis klasikan muzikon pere de tiaj miksaĵoj polemikaj. Rigardante la kantojn, ili reprezentas larĝe orientajn kaj okcidentajn komponistojn, kvankam mi ne trovis tiujn el Afriko, sed eble la intencita publiko ne agnoskus ilia muziko. Verŝajne, tiu publiko ne estas la esperantistaro, sed la tuta homaro. Mi priparolas nun la kantojn po unu:

La unua kanto estas multekultura, kvankam tra la registro ombras *La planedoj*, el Gustav Holst, je la komenco. Ne estas kaprico, ke tiu temo nomiĝas *Astro Jupitero*, kiel unu el la temoj de la fama suito de Holst. La dua kanto estas *Mistero numero kvin:* la numero omaĝas la muziko de Pjotr Iliĉ Ĉejkovski, kies kvinan sinfonion ludas la kantistoj, sed la mesaĝo kiun ili kantas esperante pri *ĝojo sen rido* kaj *ploro sen larmoj* eble referas al divorco inter kapo kaj koro. La duan temon de la sinfonio de Ĉejkovski ludas sole elektrika gitaro inter la ĥora kanto kaj sia reo. La tria numero estas la fama ***Bharata Kanto***, el la opero ***Sadko***, verkita de Nikolaj' Rimski-Korsakov, kiel oni agnoskas je la titolo de la kanto. Estas enkonduko al kanto per vulgara voĉo kiu angle diras *Yes, I knew it!* (jes, mi sciis!), al kiu alia voĉo respondas en lingvo nekonata de mi (*ia daba, iu isam*), kaj tiun surdulan konversacion interrompas la ĥoro kiu kantas Sadkon esperante: *Mi volas esti maristo, la maro estas mistera...* Citro, tiu emblema orienta muzikilo, enkondukas la kanton pri ***Tirano***, post kio

ni aŭdas solon pianan kiu similas al tiuj de Richard Clayderman, al kiu aldoniĝas sintezitaj kaj naturaj voĉoj kiuj plendas kontraŭ subpremo de tirano, subpremo kontraŭ ili invitas denonci, estante kontrasto akuta inter muziko kaj vortoj. ***Thais*** ofertas temon el tiu opero de Massenet kiu parolas pri *anĝeloj pri kiu mi revis.* La sesa kanto parolas pri Zamenhof, kiel endas pionira registro esperanta celanta la grandan publikon. La solisto de *Amplifiki* omaĝas la kreinto de Esperanto, sonante la malnovan kanton *Green Leaves* (folioj verdaj), kio taŭgas por la okazo. La sekvanta kanto estas *Lumo*, kiu demandas pri aliaj vivformoj sub la sonoj de la tria parto de la *Sinfonio el la Nova Mondo,* de Antonin Dvorak, kaj kiu estas la plej brila parto de la sinfonio, kies unua temo estas plej fama, tiu kiu temas pri manko de sia lando; sed la tria estas malfermo al la nova mondo, al la alveno, omaĝante ĝin: *Ĉu aliajn formojn havos la viv'?* Sekvas la kanto oka, kies nomo estas ***Universala Naturo***, kiu sub la sonoj de la ***Marŝo de Pompo kaj Cirkonstanco nombro 1***, de la brito Edward Elgar (konsiderita kiel la vera himno de Anglujo, ĉar la fama ***Dio savu la Reĝinon*** estas vere himno de la *Commonwealth*, tio estas, komuna riĉeco), kaj ĝi defendas, ke *homoj rajtas vivo, libereco kaj persona sekureco*, bezonataj por akcepti la invito al amo, observi kaj studi naturon. Tiun inviton oni faras al ni ĉe la kanto naŭa pere de la muzika omaĝo kiun Camilo de St. Saëns faris al naturo pere de sia ***Carnaval des animaux*** (karnavalo de bestoj), kies temo *La cigno* ilas deklari, ke estas kruela mortigi birdojn, kaj anstataŭ oni devas *kapti kantojn en la kaĝo de l' aŭdado.* Post tio, *La rido*, sub la sonoj de tio, kion oni nomiĝas kelkefoje *la himno de Eŭropo* kaj ni scias, ke estas eltirita el la ***Naŭa Sinfonio*** de L. van Beethoven. Li verkis la muzikon surbaze de la *Himno al libereco* verkita de Schiller, sed kiun la netoleremo de Metternich igis *Himno al ĝojo.* Tiu kanto diras al ni, ke ni ĉiuj bezonas ridon kiel elementon de la vivo; kaj por atingi ĝin ni devas lerni nian lingvon kaj ankaŭ Esperanton por ĉiuj, kiel *lingvo de l'Homaro.* La lasta nomigas la diskon tutan, ***Esperanto***, kaj diras, ke donacoj kaj leĝoj apartenas al ni ĉiuj, ĉar ni heredis ilin kiam ni naskiĝis; kaj finas la kanto per infana ĥorokanto al Esperanto, invitante la mondon akcepti ĝin.



Stranga afero estas, ke la kajereto kiu akompanas la registron ne diras kiu kantis, aŭ kiu ludis la instrumentojn kaj sintezilon, sed nur la firmao kiu eldonas ĝin, *Warner Española*, ke la diskon oni faris en Germanio, kaj ke estis produktita de ESPERANTO, kio mi supozas, ke estas firmao kreita *ad hoc* (por tio). Eble la ideo estas, ke la vera aŭtoro estas ni ĉiuj...

Nun mi klarigas kion mi diris je la komenco de tiu artikolo: *feliĉe* ne temas registro kun kantoj tipikaj esperantistaj, kun apartaj himnoj, nek *batalo,* nek aliaj aĵoj kutimaj en la movado esperantista. Ĉi disko estas por la publiko ĝenerala, kaj mi opinias, ke Zamenhof aprobus ĝin. Mi plie opinias, ke ni esperantistoj el la tuta mondo devus havi ĝin por subteni tiun ideon kaj helpi, ke en la estonto aperos aliajn diskojn kiel tiu, ĉar esperto diras, ke la farintoj de tiu disko obtenis multe pli por disvastigo de Esperanto ol multaj aliaj samideanoj kies streboj estis pli heroaj, sed malpli brilaj. Eble tiu disko povus esti pli bone farita, eble la lingvo uzata povus esti pli *akademia*, pli bongusta aŭ pli *perfekta...*, sed ĉiuj tiuj plioj estas usaj, kaj la aso, tio estas, la realo, diras ke *Esperanto* estas la plej perfekta, bongusta kaj akademia registro fonografika kiu estis ĉiam. Gratulon, sekve, al ĉiuj la farintoj de la disko, kaj ni rekomendu kaj aŭskultu ĝin ree, esperante, ke post ĝi aperos multaj aliaj komercaj diskoj kiuj helpos formigi pli komunikeman mondon kiu uzas Esperanton kiel ĉefan komunikilon!

*Jesús de las Heras,*

# Gramatiko

# Pri esperantaj verboj: ne pronomumaj verboj

Senca juĝo estas esprimita skribe aŭ parole per propozicio.

La propozicioj povas esti EC-PROPOZICIOJ AŬ AG-PROPOZICIOJ.

·Per EC-PROPOZICIOJ ni atribuas econ aŭ kvaliton al iu aŭ io.

Ekzemploj: *leono estas besto.*
*Li aspektis mizere.*
*La etoso iĝis sufoka.*
*La arbaro ŝajnas ploranta en aŭtuno.*
*La lingvo devas ne ŝajni bona sed esti bona.*

Do, la verboj *esti, aspekti, iĝi, sajni,* nomatas KOPULATIVAJ ĉar ili ligas la subjekton kun predikato.

Aliaj verboj esprimas staton aŭ pozicion de la subjekto: tiuj verboj nomatas "stat-verboj": *farti, frosti, kaŭri, kuŝi, sati, sidi, soifi, stari..., ĈIUJ NE TRANSITIVAJ.*

-Sed verboj kiuj esprimas agon, nomatas AG-VERBOJ kaj siaj propozicioj, AG-PROPOZICIOJ.

*Transitiveco estas kvalito kiu permesas al verbo transmeti sian agon sur objekton, kaj verboj kiuj havas tiun ag-povon nomatas TRANSITIVAJ.*

Kontraŭe AG-VERBOJ kiuj ne havas tiun povon nomatas NE-TRANSITIVAJ: ekz.: *koleri, labori, promeni, vivi, zorgi,* ktp. Kompreneble laŭ tiu difino ĉiuj verboj transitivaj estas samtempe ag-verboj.

Sed ankaŭ oni povas difini la *transitivecon* kiel energion enhavatan de la verbo, dank' al kiu, la subjekto efikas sur objekton.

Rimarku kiel en la frazo *mi donas la libron*, la ag-senco signas al objekto, neniam al subjekto. Do, la transitivaj verboj signas direkton ĝis objekto kiu ricevas la N.

Sed la demando pri kiuj kriterioj oni devas postuli por konsideri tian difinitan verbon transitiva aŭ ne, havas tre malfacilan respondon (vidu Bernard Golden - Bulgara Esprantisto, junio 1991).

La verboj *signifi* aŭ *simili*, kiuj de komence ŝajnas kopulativaj estas tamen transitivaj, eble por ke ni klare diferencigu *signifanton* disde *signifato* aŭ *similanton* de la responda *similato*. Ekzm.: *la mondo ne estas hospitalo kvankam TION ja ĝi similas.* Koncerne la transitivecon eĉ la esperantaj verboj montriĝas diverse laŭ P.V. de Grosjean-Maupin aŭ P.I.V. de Waringhien (Vidu ***Valencia Luno*** n° 31, VALE).

Krom la rekta objekto, pluraj aliaj komplementoj kompletigas predikative la sencon de la juĝo: Ekzm.: *li sendas al sia patro* (ne rekta objekto), *la libron* (rekta objekto) *por ne perdi ĝin*(adjekto). Tial ke la transitiveco ne respondas laŭ diversaj lingvoj ĉe la samaj verboj, ni ofte devas konsulti pri tio ĉe la esperantaj verboj, en niaj vortaroj.

Ĉe verbo transitiva, metu ni akuzativon en la ne-rektan objekton antaŭ la foresto de la rekta objekto.

Ekz: Ne *ricevi al la mastro,* sed *ricevi la mastron.*

Ne *finfine mi skribas al vi*, sed *mi skribas vin.*

Ne *pardonu al mi*, sed *pardonu min.*

-En niaj okcidentaj lingvoj ekzistas verboj transitivaj plej ofte uzataj ne-transitive (per nia refleksivo SE) kiuj tamen en Esperanto estas ĉiam, per si mem, ne transitivaj. Tiuj verboj nomatas NE-PRONOMUMAJ VERBOJ laŭ koncepto de FERNANDO DE DIEGO, kaj pli-malpli devas esti parkere lernitaj por ne stumbli pri ili. Kompreneble tiuj verboj neniam prenas IĜI!

Tiuj verboj estas:

degni (dignarse),
droni (ahorgarse),
embuski (esconderse),
enui (aburrirse),
erari (equivocarse),
fali (caerse),
fervori (enfervorizarse),
gasti (hospedarse),
gliti (resbalarse),
ĝoji (alegrarse),
halti (detenerse),
hasti (apresurarse),
honti (avergonzarse),
indigni (indignarse),
inklini (inclinarse),
koleri( encolerizarse),
konduti (comportarse),
kuraĝi (atreverse),
miri (admirarse),
moki (burlarse),
obstini (obstinarse),
oponi (oponerse),
paŭti (enfurruñarse),
peni (esforzarse),
penti (arrepentirse),
plendi (quejarse),
plezuri (deleitarse),
plonĝi (lanzarse),
profiti (aprovecharse),
putri (pudrirse),
resti (quedarse),
rezignacii (resignarse)
ribeli (rebelarse),
rifuĝi (refugiarse),
sinki (desplomarse, hundirse),
stagni (estancarse),
sveni (desmayarse),
ŝimi (enmohecerse),
ŝrumpi (arrugarse, cuartearse),
ŝveli (hincharse),
tualiti (acicalarse),
velki (marchitarse).

Mi ege dankas al Bernard Golden lian artikolon *Vidpunktoj pri verba transitiveco en Esperanto*, publikigita en ***Bulgara Esperantisto*** (junio 1991), kiu respondis multajn el miaj duboj pri tiuj temoj. Sed mi nun kuraĝas demandi lin:

La 15ª regulo de la ***Fundamenta Gramatiko*** rajtigas enkonduki en Esperanton la tiel nomatajn fremdajn vortojn. Sed kiam tiu vorto estas verbo, ĉu ni rajtas elekti por ĝi la transitivecon aŭ ne-transitivecon LAŬ LA PLEJ BONA EŬFONIO DE NIA LINGVO?

Kial *ekfloris en la gorĝo de multaj engaĝiĝintaj trobadoroj* kaj ne *ekfloris en la gorĝo de multaj engaĝintaj trobadoroj*?

Do, *engaĝi* (comprometerse, ntr) kaj NE-PRONOMUMA VERBO. Ĉu?

Kaj se en Esperanto restas ankoraŭ radikoj de duba naturo, ekzemple *flor, milit, plant...,* kial ne meti en tiun grupon la radikon *publik* kaj forlasi por ĉiam la sufikson *ig* por la participo, do *la artikolo publikita* kaj ne *publikigita*?

Antaŭdankon pro via respondo,

VALE.


Bibliografio:

1 Golden, Bernard: ***Vidpunktoj pri verba transitiveco en Esperanto.*** Bulgara Esperantisto. Junio 1991.

2 De Diego, Fernando: ***Nuevo método de Esperanto.*** 1982.

3 Vale: *Pri esperantaj verboj: transitiveco.* ***Valencia Luno*** nº 31.

4 Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

# Demokratio kaj Malsubmetiĝo

Post multaj jaroj de armeoserva devigo en la Ŝtato de Hispanio, sen leĝa ebleco fari konsciencan obĵeton kontraŭ tiu altrudo, finfine tiu ebleco estis reguligata kaj legalizata simile al aliaj eŭropaj landoj. Oni interkonsentis por la konsciencaj obĵetantoj alternativajn sociajn servojn. La nova leĝa kadro estigis du fenomenojn:

1e.- Rapidegan pliigon, laŭ geometria progresio, de la nombro de obĵetantaj junuloj okaze de ĉiu jara rekrutalvoko. En kelkaj regionoj la nombro de la obĵetantoj superis tiun de la rekrutoj.

2e.- La aperon de neatendita fenomeno de politike organizita malsubmetiĝo kontraŭ la armeoserva devigo kaj sia deviga alternativo, la socia servo. Tiu ĉi fenomeno estas starigita de pacismaj movadoj kaj radikalaj maldekstraj grupoj.



## La malsubmetiĝo kiel tipo de civila malobeo.-

Oni povas difini la civilan malobeon kiel tipon de politika legitima interveno en demokratiaj ŝtatoj, realigata publike, kolektive, antaŭpripense, kaj neperforte, kiu per malobeo al estrara ordono; kies valideco povas esti evidenta aŭ pridubinda; strebas al socia plibonigo, ne al profito de la intervenintoj, kaj kiu tuŝas la rezonkapablon kaj la justemon de tiu socio por estigi ŝanĝon de leĝo aŭ estrara programo. La malsubmetiĝo estas tipo de civila malobeo kiu celas la abolicion de la armeo serva devigo, kaj poste, la malaperon de la armeoj mem kaj de la plago de la militistismo.

## La malsubmetiĝo kaj la konscienca kontraŭarmea obĵeto

La konscienca obĵetado devenas de persona kaj nepublika rifuzoj kontraŭ la uzado de la perforto kiel rimedo solvi konfliktojn interŝtatajn, tamen la obĵetantoj rispektas la parton de la leĝo kiu devigas ilin fari taskojn socie utilajn kiel alternativon al la armea devigo. Tamen, la malsubmetiĝo,kvankam deveninta de konscienca elekto, celas ŝanĝon de la ekzistanta leĝaro kaj rifuzas akcepti iun ajn alternativan servon argumentante ke per la obeo de tiu ĉi devigo plifirmiĝas la sistemo de devigita rekrutado, sistemo pritaksita de la malsubmetiĝuloj kiel sekvestron amasan legalizitan.

## Malsubmetiĝo kaj legitimeco demokratia

Oni kutimas diri ke ne estas justigeble malplenumi ĉi tiel leĝon en socio demokratia kie ekzistas eblecoj modifi la leĝojn per instituciaj rimedoj. Aldone tion oni estas argumentinta ke, ĉar jam ekzistas leĝa regularo por la konscienca obĵetado, la malsubmetiĝo ne plu estas justigebla, ĉar jam estas solvita la konflikto inter la konscienca libereco kaj la devo defendi la patrujon per la armiloj, esprimita de la deviga armeoservo. Tiu ĉi lasta argumento estas same malkongrua ol tiu unua, ĉar la malsubmetiĝo nek obĵetas la plenumon de la armeoservo nek de ĝia alternativo, sed ĝi kontraŭstaras la ekziston de ambaŭ provizoraj sklavigoj kaj malhelpas la efektivigon de nemalmultaj rajtoj de miloj

da virjunuloj ĉiujare. Ambaŭ devigaj servoj precipe malfaciligas la integriĝon de la virjunuloj en la labormerkaton, kaj kelkfoje; malgraŭ la klara malpermeso de la hispana leĝo; la objĵetintoj faras senpage sociajn taskojn anstataŭante profesiulojn de tiuj fakoj, kio kontribuas negative al la solvo de la sendunga problemo. Rilate la unuan argumenton estas eble diri, ke la konsidero de demokratio kiel nura balotpartopreno malplenigas sian sencon mem. Egaligi demokration kaj konstituciecon estas trompo, ĉar iu ajn leĝo, aŭ multaj, ne gravante la vastecon de sia parlamenta apogo, povas atenci contraŭ la indeco de la homoj, kaj ĉar laŭkonstitucie en Hispanio estas ege limigitaj aliaj manieroj de civitana partopreno en publikaj aferoj, kiel ekzemple: popolaj leĝoreformaj iniciatoj, referendumoj, eblecoj malvalidigi balotintajn postenojn fare de azembleoj de balotintoj, ktp. Male plu estas kutimaj la manipuladoj de la voloj de la balotintaro fare de la balotitoj kaj la stabanoj partiaj.

Se devas ekzisti iu ajn devo al la ŝtato, tiu ĉi devas havi limojn, kaj la perforta rekrutado superas ĉiujn. La malsubmetiĝo estas mem aserto firma pri ke antaŭ leĝoj kontraŭmoralaj la individuo kiu volas agi moralakorde havas la devon malobei ilin. La morala devo malobei tiujn leĝojn ne estas absoluta, ĉar al neniu oni rajtas postuli obeon al morala normo kiam la kosto suferota de la obeinto estos puno superproporcia rilate la gravecon de la malobservo. En la Hispana Puna Kodo estas interkonsento pri punoj por la malsubmetiĝo konsistanta el dujaraj restadoj en senliberulejoj plus periodo de 8 ĝis 14 jaroj de sentaŭgigo por profesii publikajn (t.e.: de la ŝtata reto) postenojn aŭ ricevi ŝtatajn stipendiojn.

*Enrique Cabrera,*
*Insumiso (malsubmetiĝinto)*

# La paĝo de Fernando Sor



Oni asertis pli ol unufoje, ke ni esperantistoj —eĉ laboristaj— nur rigardadas nian umbilikon, anstataŭ labori kaj verki pere de nia lingva ilo, se okaze ĝi estas *lingvo* kaj *ila*. Promenante laŭ la reto, oni trovas multekolorajn paĝojn pri Esperanto, pri esperantistoj, ĉiaj demandaroj kaj respondaroj pri nia bela lingvo, pri la lingva problemo, kaj tiel plu.

Sed ni kelkfoje trafas *nepriesperantajn* dokumentojn verkitajn en Esperanto, kiel tiun pri ***Fernando Sor: Komponisto, Gitaristo, Homo***. Manko da loko malpermesas pli longan klarigon pri tiu paĝo, sed ni povas diri almenaŭ, ke temas la paĝo pri la vivo de la plej fama gitaristo de Hispanio, kaj ke liaj verkojn seriozaj gitaristoj ludis ĉiam. Se vi vizitas tiun paĝon, vi povos aŭskulti pli ol dudek verkojn de Fernando Sor, se vi havas sonkarteton. Ili estas bele enkomputiligitaj ne nur por gitaro, sed por pluraj aliaj muzikiloj. Krome, la verkisto de la paĝo ankaŭ sukcesis publikigi artikolon pri ĝi *en Esperanto* kaj ankaŭ en la hispana kaj en la angla en du internetaj magazinoj pri gitaro, ***Cejilla*** kaj ***Guitar and Lute Issues***, kie vi povos legi pli detalojn pri la paĝo. La adreso de ***La paĝo de Fernando Sor*** estas http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/sor.html; tiu de ***Cejilla***, http://www.drangonfire.net/~LBGP/index.html; kaj tiu de ***Guitar and Lute Issues,*** http://www.orphee.com/pluck.html. Eble tiu estas la vojo: se vi zorgas pri ion ajn, verku pri ĝi *esperante*!

*Eŭlalja Ruiz*

# LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

## El *Lirikaj perloj de Al-Andalus*,

### *de Antonio Marco Botella*



Laŭ certaj biografioj, Ibn Arabí verkis milon da titoloj. Carl Brockelman eldonis pli ol 200 titolojn; Osma Yahyà kalkulas ĉirkaŭ 550 manuskriptojn, el kiuj 400 verkoj sendube partenas al li, kvankam malmultaj restas, inter ili kelkaj tre gravaj: *Kitab al-Futuhat al-Makkyya* (libro pri revelacioj de Mekko): *Kitab Ŝarh Fusus al hikam* (la saĝo de la profetoj), kolekto da biografioj de sanktaj al-andalusanoj, du kolektoj da poemoj, k. a. La cititan *Kotab Ŝarh Fusus al hikam*, ankoraŭ ekzistanta, oni rigardas lia testamento kaj elmontro de lia kosmologio, t.e., lia filozofia kaj religia idearo. Tiu majstro de la sufisma doktrino, postlasis multajn disĉiplojn en la islama mondo, kaj en Al-Andalus. Citintas Ibn Sabin, naskiĝinta en la valo de Ricote (Murcio) kaj aŭtoro, ene de la sufisma doktrino, de originala idearo nomata *unikismo*, kiu dum certa tempo havis multajn adeptojn.

Ibn Arabí, la granda *Muhyi al-Din*, forpasis la 16-an de novembro de la jaro 1240, en Damasko, kie li estas ankoraŭ estimata kaj respektata kiel unu el la plej elstaraj mistikuloj el Islamo.

Sub la ombro de tiu intelekta giganto kaj eminenta lirikulo verkis aliaj poetoj. Ekzemple, la eminentan Abu Bakr Sawan ibn Idris, naskiĝinta el Murcio (1165a.j.), aŭtoro de tiu ĉi poemo:

**_Priamaj scenoj_**

*Kiom bela ŝi aspektas!*
*tamen tia granda belo*
*apenaŭ trafe prezentas*
*de ŝia tuto parteton:*
*Ne ekzistas sorĉ' pli rava*
*nek pli loga mov-kadenco*
*ol la ŝiaj, kiuj tentas*
*al priamaj deziregoj.*

*Belas ŝi kiel lunlumo*
*kun tia ĉarma aspekto*
*ke eĉ lun' sur la spegulo*
*volus konfesi la senton*
*simili ŝin aŭ la lumon*
*de ŝiaj puraj reflektoj!*

*Sur ŝia blanka vizaĝo*
*kaprica vangonevuso*
*puntktumas kvazaŭ sur paĝo...*
*kaj ŝiaj tempiaj bukloj*
*skribas sur la belaj vangoj*
*vortojn de ŝiaj amĵuroj.*

*Iam mi ŝin akompanis,*
*kiam alvenis la nokto,*
*kaj ŝiaj spiroj min ravis,*
*ardis de pasi' la koroj...*
*Mi, kontraŭ mi ŝin premadis*
*kiel avarul' trezoron*
*preta ĉion akapari*
*per sia avid-fervoro.*

*Premita per miaj brakoj,*
*fortaj kiel dikaj kordoj,*
*ĉar ŝi emis foreskapi*
*kiel gazel' aŭ leporo,*
*mi, kun ĉasta embaraso*
*bremsis mian fortan volon*
*kisi ŝin kun ama ardo!*

*Mi sentis bruli la koron,*
*kaŝita en ŝiaj braĝoj!*
*Imagu soifan homon*
*kaj tamen havantan l' akvon*
*tutproksima al la gorĝo*
*sen la plezur' de l' trinkado.*

*Kiom bela ŝi aspektas!*
*Kiom logas ŝia ravo!*

Daŭrigota

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
**E30080 MURCIA,**
**HISPANIO**

**Retskribu al**
**jesuo@mur.hnet.es**


**http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.html**



## Verkisto estas laboristo

### Omaĝo al virino laborista
### estu ĉiu tago


**Depósito legal: MU-798-1996**
**Presejo: Anka Ĉus.**